Universala Esperanto-Asocio

ALRIGARDO AL AZIO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2017-36 sendita el Budapeŝto, la 27an de decembro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Estrarano de UEA en Ĉinio – nia kresko-zono






Okazis la eldonfesto de la libro 'Teo kaj Amo - Rakonto pri Teo (320 paĝoj)' en la 14-a de decembro en Pekino, Ĉinio, realigita de Pekina Esperanto-Asocio, Ĉina Radio Internacia kaj la Ĉina Fremdlingva Eldonejo. La libro estis projekto de tiu eldonejo, kun la kompilanto s-ino Zhang Ping (Ĝoja) sur la foto dekstre.. La libro konsistas el kvar partoj: 'Teo kaj Amo', Urboj de 'Teo kaj Amo', Anĝeloj de 'Teo kaj Amo', kaj Vortoj de 'Teo kaj Amo'. La libro estas dokumentaro pri la dufoje okazigitaj filmo-festivaloj. La estrarano de UEA pri la Azia movado, s-ro LEE Jungkee, transdonis gratulmesaĝon de d-ro Mark Fettes, la prezidento de UEA. En la eldonfesto ĉeestis s-ro Ragnar Baldursson, vicambasadoro de Islando en Pekino, kaj s-ro Rafael Henrique Zerbetto el Brazilo, volontulo ĉe *El Popola Ĉinio*.

La urbo Tianjin estas unu el la grandaj urboj de Ĉinio, kun loĝantaro de 17 milionoj. En la 17-a de decembro okazis la jarkunveno de 'Tianjin-a Esperanto-Asocio' en kiu kolektiĝis ĉ.30 esperantistoj. En la kunveno s-ro LEE Jungkee prelegis kun la temo 'UEA -- kiel fortigi ĝin?'. LEE emfazis ke por plikreskigi la membro-nombron de UEA, Esperanto-kursoj devas okazi de loko al loko, prezentante sian sperton en la Seula Esperanto-Kulturcentro. Korea esperantista karavano vizitos Pekinon kaj Tianjinon en la jaro 2018 por interamikiĝo de la du najbaraj landoj.




# Universitata agado en Irano

La 30-an de oktobro okazis libera seminario pri Esperanto en la Universitato “Allame Tabatabai” en Tehrano sub la gvido de s-ro/inĝeniero Ahmadreza Mamuduhi. Partopreno estis libera en la seminario, kun la celo poste starigi E-kursojn en tiu universitato. En la 7a de novembro 2017 en la universitato “Pajeme Nur” sekvis la sama seminario. En ambaŭ universitatoj jam okazas baza kurso.

Raportis: Simin Emrani.



Memuma foto de la Zamenhofa Festo en Tehrano.

# Japana ikono flugas en Francio

“Antaŭ du semajnoj mi sendis du grandajn karpojn al elementa lernejo en Marseille, Francio. Tiujn karpojn japanoj hisas en la Knaba Tago, la 5an de majo. Mi havas esperantistan amikinon en tiu lernejo kaj mi foje sendas japanaĵojn al ŝiaj gelernantoj. Kiam la pakaĵo estis malfermita, la klasĉambro estis plenplena de ĝojkrioj. Vidu, kiel ĝojaj estas la gelernantoj!”

Vidu la foton sur la sekva paĝo.



Raportis: HORI Jasuo (s-ro), JP-371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3.

<hori-zonto@water.sannet.ne.jp>

# Laborpropono en Ĉinio

La Profesia kaj Teknika Kolegio Pingliang (provinco Gansu), kun 500 laborantoj kaj 6000 studentoj, intencas inviti du ĝis kvar eksterlandajn volontulojn por instrui la anglan lingvon kaj samtempe funkciigi Esperantajn lecionojn kiel nedevigan programon por interesataj studentoj kaj instruistoj. La kandidatoj devas bone regi Esperanton kaj la anglan lingvon. La kolegio liveros al ĉiu volontulo senpagan loĝadon kaj monate 2000 RMB da honorario, kiu sufiĉas por pagi bonan manĝadon de minimume du homoj en la manĝejo de la Kolegio. La volontuloj povos volontuli unu semajnon ĝis 12 monatojn laŭ sia plaĉo. Al tiuj kiuj laboras pli ol 6 monatojn, la Kolegio repagos la koston de la dudirektaj vojaĝoj. La retejo de la Kolegio: http://www.plvtc.cn/.

Lokaj esperantistoj en la Esperanto-Centro Ora Ponto en Ĉinio, pretas helpi en la instruado de Esperanto en la kolegio. Interesatoj pri tio kontaktu s-ron Trezoro Huang Yinbao<trezoro@qq.com> kaj s-ron Ardo<esphugp@126.com>. skajpo: huangyinbao.

Vikipedio en la angla: https://en.wikipedia.org/wiki/Pingliang. Esperanta versio ne estas,

Vortoj: 545

====================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.